# Boletín

## Federación Española de Esperanto

### Asociación de Utilidad Pública



n-ro 322 (jul.aŭg.) septbro-oktbro 1995

# Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
Aperanta de 1949

## Ĉefredaktoro

Antonio Marco Botella
Av. Compromiso de Caspe 27-29, 9º C
ES-50002 Zaragoza

## Redaktoroj kaj kunlaborantoj

Salvador Gumá Clavell
Miguel Fernández Martín
Vicente Hernández Llusera
Andres Martín González
Luis Serrano Pérez
Miguel Gutiérrez Adúriz
Antonio Valén Fernández

**Federación Española de Esperanto**
(Información y administración)

**Hispana Esperanto-Federacio**
(Informado kaj administrado)

Rodríguez San Pedro 13-3º-7
ES-28015 MADRID
Telefono + faksilo: +34-(9)1-446-80-79

## Estraro

*Prezidanto*: Antonio Alonso Núñez
*Sekretario*: Marcos Cruz Martín
*Vicprezidanto*: José Mª Galofré Domingo
*Kunordiganto:* Miguel Gutiérrez Adúriz
*Kasisto*: José Mª Bernabeu Franco
(Konto: 14.011.966 de Caja Postal)

*Kovrilo:* Antonio Marco Botella, ĉefradaktoro de Boletín.

*Noto:* Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

## ENHAVO

Invito al HEF-Kongreso . . . . . 2
Provizora Kongresprogramo . . . . . 3
Spezokonto de HEF . . . . . 4
Alvoko al la Ĝenerala Kunsido de HEF . . . . . 6
Spezokonto de Libroservo . . . . . 7
Jarraporto de la HEF-estraro . . . . . 8
Malgoja novaĵo . . . . . 10
Viglas la movado . . . . . 11
Niaj financoj *Andrés Martín* . . . . . 14
Ekonomio . . . . . 15
Klaĉoj. + ...kaj viglas plu . . . . . 16
Sukcesa UK en Tampereo . . . . . 18
Mi estis en Gdansko *Miguel Fernández* . . . . . 20
Kiun lingvaron vi parolas? *Renato Corsetti* . . . . . 22
Identiga ludo *Bernard Golden* . . . . . 26
Premiera antologio en Esperanto (R) *Nicolás López Escartín* . . . . . 28
Survoje al universala civilizacio (R) *Rafaela Urueña* . . . . . 31
Jam aperis Mazi . . . . . 32

# Invito al HEF-kongreso

Kiel niaj legantoj scias, en la pasinta Malaga HEF-kongreso neniu hispana esperantista rondo sin proponis por organizi la tutlandan kongreson en 1995. Komence de la jaro la Estraro faris plurajn demarŝojn por eventuale okazigi ĝin en la nordo de nia lando. Malfeliĉe, tiuj bonaj intencoj ne sukcesis. Fine, kaj jam sen la sufiĉa tempo por novaj esploroj, la HEF-estraro decidis proponi al la organizantoj de la Tria Internacia Kultura kaj Turisma Semajno okazigi la Kongreson kunlige kun la Semajno, profitante la infranstrukturon de tiu evento, en SALOU (Tarragono).

Hispana Esperanto-Federacio - 54a HK Salou

La 3a Internacia K. kaj T. Semajno okazos de la 4a ĝis la 11a de novembro 1995, kaj la HEF-kongreso de la 9a ĝis la 12a, ambaŭ kunordigitaj en komuna programo, sed kun specifaj programeroj por ambaŭ partoprenantaj kolektivoj. HEF dankas al niaj katalunaj kolegoj tiun ĝentilan akcepton, ĉar tio donas al la HEF-anaro la eblecon, ne nur ekzameni nian agadon laŭlonge de la pasinta jaro, sed ankaŭ studi kaj programi la venontan, kun ampleksa partopreno kaj speciala atento al la aktualaj cirkonstancoj.

La urbo kie okazos Semajno kaj Kongreso, Salou, sur la tiel nomata "Ora Strando", situas en paradiza loko de la Tarragona marbordo: milda klimato, karesanta suno en novembro, serenaj ĉieloj kaj belaj promenejoj invitantaj al apudmaraj promenadoj kaj trankvila pripensado. Tiu ĉi urbo famiĝis en Eŭropo pro tiom da allogaj ĉarmoj, kaj sekve, miloj da turistoj amase vizitas ĝin ĉiujare kaj ĝuas la trankvilan maron kaj belajn mediteraneajn plaĝojn...

Restadejo, kunvenejo kaj centro de aktivaĵoj de la partoprenantoj en la *Semajno* kaj en la *HEF-Kongreso* estos la hotelo "Belvedere", (en la centro mem de Salou), kun preskaŭ 400 ĉambroj kun banujo, telefono kaj aliaj komfortaĵoj. En tiu medio ni prezentos interesan programon kun konvenaj kaj proporciaj tempoj por laboro kaj amuzo, kiel decas, ĉar en la origino de ambaŭ proponitaj rendevuoj vibras tiuj du malsamaj kaŭzoj.

*Hispana Esperanta Fervojista Asocio, Hispana Esperanto-Muzeo* kaj *Hispana Esperanto Federacio*, organizantoj kaj kunvokantoj de tiu ĉi kunvenego, INVITAS la hispanajn geesperantistojn kaj al niaj eksterlandaj amikoj, partopreni en tiu ĉi interesaj *Semajno* kaj *Kongreso* okazonta en la revoveka urbo Salou, tie, tute apude al la bela Mediteranea maro...

*La Organizantoj*

---

# Provizora kongresprogramo

95.11.09 (ĵaŭdo).
Matene:
10a h. Disdonado de dokumentoj kaj "Interkona mateno".

Vespere:
17a h. "La transa lingvo", prelego de s-ano Paskal Font.
18a h. Librofesto (prezento de novaj libroj, interalie la nova lernolibro de Esperanto).

95.11.10 (vendredo).
Matene:
10a h. "Tolero", prelego de S-ro Luis Serrano Pérez.
11a h. Malfermo de la Kongreso.

Vespere:
Duontaga ekskurso, ĉu al ludparko *Port Aventure*, ĉu al Reus.

95.11.11 (sabato).
Matene:
10a h. Fermo de la 3a Internacia E-semajno de la Kulturo kaj Turismo.
11a h. «Mia lirika ama travivaĵo», prelego de s-ro Miguel Fernández Martín.
12a h. Inaŭguro de «Esperanto»-strato en Salou.

Vespere:
17a h. Hispanlingva prelego de Juan Antonio Cabezos.
18a h. Laborkunsidoj.

95.11.12 (dimanĉo).
Matene:
10a h. Ĝenerala Kunsido de HEF. Transdono de la premio "Klara Silbernik".
12a h. Solena Fermo de la 54a Hispana Kongreso.
Komuna tagmanĝo kaj adiaŭo.

Sendu la kotizon al *Caja de Ahorros y Pensiones de Barcelona*, n-ro 2100-0461-96-0200045498. (Mepre skribu la vorton «kongreso»). Vidu la kongreskotizojn sur Boletín (321, 31a p), sed atentu, ĉar la unua lim-dato por pagi estas erara. Ĝi devas teksti: 30-9-95.

**54a Hispana Kongreso, c/ Font Nova 32. ES-08202 Sabadell**

# FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

## BALANCE DE SITUACIÓN

### ACTIVO

| | | | |
|---|---|---|---|
| B) | INMOVILIZADO | | 10.580.000 |
| III | Inmovilizaciones materiales | 10.580.000 | |
| | 1.- Oficina de HEF | 10.000.000 | |
| | 2.- Ordenadores | 200.000 | |
| | Fax | 50.000 | |
| | Encuadernador | 30.000 | |
| | 3.- Mobiliario | 100.000 | |
| | 5.- Biblioteca | 200.000 | |
| D) | ACTIVO CIRCULANTE | | |
| II | Existencias | 34.367TE | |
| | 1.- Libro para vender | 34.367 | |
| III | Deudores | — | — |
| VI | Tesorería | | 3.021.436 |
| | 1.- Caja | 29.424 | |
| | 2.- Cta. Caja Postal (Oficina) | 113.230 | |
| | 3.- Cta. Caja Postal HEF | 2.814.002 | |
| | 4.- Cta. en UEA | 64.780 | |
| | 5.- Cta. en Banesto — (Cancelada) | | |
| | TOTAL GENERAL . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | | 13.635.803 |

### PASIVO

| | | | |
|---|---|---|---|
| A) | FONDOS PROPIOS | | 13.623.803 |
| | I Fondo Social HEF | 11.040.151 | |
| | VI Pérdidas y GANANCIAS | 2.583.652 | |
| E) | ACREEDORES A CORTO PLAZO | | 12.000 |
| | IV Acreedores Comerciales | | |
| | 2.- Deudas por compras | 9.750 | |
| | VII Ajustes por periodificación | | |
| | Cuota pagada por adelantado. | 2.250 | |
| | TOTAL GENERAL . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | | 13.635.803 |

# FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

## CUENTA DE EXPLOTACIÓN

### DEBE

| | | | |
|---|---|---|---|
| A) GASTOS | | | 693.314 |
| 2.- Aprovisionamiento | | 78.316 | |
| Compras | 70.618 | | |
| Variación Exit. libros | 7.698 | | |
| 3.- Gastos de Personal | | 56.418 | |
| Gastos Sr. Presidente | 56.418 | | |
| 6.- Otros Gastos de Explotación | | 512.170 | |
| Mantenimiento | 375 | | |
| Comunidad | 72.420 | | |
| Servicio Informáticos | 735 | | |
| Cuota EUA | 78.674 | | |
| Seguros Edificio | 5.989 | | |
| Edición BOLETÍN | 275.954 | | |
| Libro servo | 3.468 | | |
| Luz | 16.756 | | |
| Teléfono | 57.799 | | |
| I. BENEFICIOS DE EXPLOTACIÓN | | | 476.961 |
| 7 Gastos Financieros | | 26.458 | |
| Comisión cobro recibos | 17.972 | | |
| Comisión Dev. recibos | 8.486 | | |
| III BENEFICIOS DE LAS ACTIVIDADES ORDINARIAS | | | 456.908 |
| 11. Pérdidas procedentes inmovilizado | | 5.912 | |
| Varios conceptos | 5.912 | | |
| IV RESULTADOS EXTRAORDINARIOS POSITIVOS | | | 2.140.784 |
| V BENEFICIOS ANTES DE IMPUESTOS | | | 2.597.692 |
| 15. Impuesto de sociedades | | 14.040 | |
| Impuestos I.B.I. | 12.956 | | |
| Ret 25% en bancos | 1.084 | | |
| VI RESULTADOS DEL EJERCICIO (BENEFICIO) | | | 2.583.652 |

## HABER

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| B) | INGRESOS | | | 3.276.966 |
| 1. | Ingreso neto de cifra de negocios | | 1.098.865 | |
| | Venta de Libros | 26.587 | | |
| | Ingreso de Cuotas | 995.066 | | |
| | Ingresos varios | 62.212 | | |
| | Ingresos cursos | 15.000 | | |
| 4.- | Otros ingresos | | 25.000 | |
| | Ingresos guía excursionistas | 25.000 | | |
| | Ingresos participaciones en capital | | 6.405 | |
| | Intereses bancarios | 6.405 | | |
| II | RESULTADOS FINANCIEROS NEGATIVOS | | 20.053 | |
| 12 | Ingresos Extraordinarios | | 2.146.696 | |

# Alvoko al la Ĝenerala Kunsido de HEF

Konforme al sia Statuto, la HEF-estraro alvokas ĉiujn membrojn al la Ĝenerala Ordinara Kunveno okazonta en Salou, en salono de hotelo «Belvedere», la dekduan de novembro 1995 je la 10a horo.

TAGORDO

1. Prezento, lego kaj eventuala aprobo de la protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunveno.

2. Prezento, studo kaj eventuala aprobo de la kontoj de HEF kaj Libro-Servo. Debato pri kotizoj de hispanaj Asocioj kaj Esperanto-Grupoj.

3. Raporto pri aktivaĵoj dum 1994 fare de la HEF- Prezidanto.

4. Premio Klara Silbernik.

5. Elekto de du HEF-membroj por kontroli la Konto-Etatojn de 1995.

6. Demandoj, petoj, proponoj.

Kiel anoncite en la Programo, la kunveno de prezidantoj kaj akredititaj reprezentantoj de Asocioj kaj Grupoj okazos la 11an, vespere.

# ENSPEZOJ KAJ ELSPEZOJ DE LIBROSERVO

## ENSPEZOJ

| | Pesetoj | Pesetoj |
|---|---|---|
| Antaŭa Saldo | | 38.841 |
| Vendado de libroj | 1.164.437 | |
| Interezoj konto Posta Kaso | 45 | |
| Diversaj abonoj por 1994 | 89.510 | |
| Aliaj enspezoj | 350.997 | |
| JAR-ENSPEZOJ | | 1.604.989 |
| ENTUTE | | 1.643.830 |

## ELSPEZOJ

| | | |
|---|---|---|
| Aĉetado de libroj | 995.161 | |
| Materialo por oficejo | 69.420 | |
| Poŝto (poŝtmarkoj, O.I.C.) | 55.648 | |
| Transporto de libroj | 27.910 | |
| Bankaj elspezoj | 17.250 | |
| Diversaj abonoj por 1993-1994 | 105.210 | |
| Aliaj | 351.100 | |
| JARELSPEZOJ | | 1.621.699 |
| Saldo al nova konto | | 22.131 |
| ENTUTE | | 1.643.830 |

**Valladolid, 31an de Decembro 1994**

La Prezidanto
Antonio Alonso Nuñez

La Libroservanto
Luis Hernández García

U.E.A. en- kaj elspezoj 338,27 NLG.



# Jarraporto de la HEF-estraro

### ĜENERALAĴOJ

Por venki la insidan disecon de la estraro, ĝiaj membroj pli ofte intertelefonis kaj korespondis por solvi difinitajn aferojn, kio pliglatigis solvon de pluraj problemoj. En la HEF-oficejo okazis unu estrarkunsido en novembro 1994a kaj pluraj kunsidoj de komisionoj.

Nia prezidanto, Antonio Alonso Núñez, reprezentis la Federacion en la ĉi-jara Eŭropunia Kongreso de Esperanto, okazinta en Parizo.

### ADMINISTRADO

Unuafoje HEF disponas ĉi-jare kompletan librotenadon laŭ oficiala sistemo. La grandan laboron faris nia madrida membro s-ro Pedro Garrote, kiel ofertite de li mem dum la pasinta HEF-kongreso. Nia kasisto, José María Bernabéu, regule sendis al la HEF-oficejo la bezonatajn informojn por tiu laboro. Pedro tre efike kreis la novan librotenadon por 1994, daŭrigis ĝin por la nuna jaro, kaj instruis aliajn kunlaborantojn okupiĝi pri ĝi.

La vivsituacio de la laborantoj de la HEF-oficejo estis tre neregula, jen la precipa kialo de ioma stagno dum la lasta jaro. Feliĉe, fine de 1994 translokiĝis de Segovio en Madridon Manolo Parra, kiu de tiam deĵoris en la HEF-oficejo marde vespere. Lia helpo ebligis plu teni la plej necesajn oficejajn taskojn, malgraŭ la neregula disponebleco de la aliaj kunlaborantoj.

Dum pluraj monatoj oni do deĵoris regule nur marde vespere, kaj, kompreneble, la respondo al leteroj kaj telefonvokoj iom prokrastiĝis malgraŭ, ke la sekretario plu okupiĝis pri diversaj HEF-aferoj jen hejme jen oficeje dum semajnfinoj, laŭ lia disponebla libertempo.

La administra laboro ĝenerale funkciis iom post iom pli glate. La pli ofta komunikado inter la kasisto kaj la sekretario solvis rapide plurajn aferojn.

Rimarkindas, ke iom post iom pli da HEFanoj kontaktas la HEF-oficejon por peti informojn aŭ solvi administrajn aferojn. Bedaŭrinde ne eblis respondi ĉiujn akurate aŭ eĉ entute. Ĉar ekde nun oni ree deĵoros du vesperojn semajne, kaj ĉar la HEF-datenaron la sekretario ĉi-somere definitive movis kaj en novan datensistemon tre pli facile uzeblan ol la antaŭa, baldaŭ eblos okupiĝi pri pli da aferoj semajne, kaj pli efike ol ĝis nun.

HEF-anoj kiuj pagas per banko estas ankoraŭ tre malmultaj, sed la

nombro iom kreskis dum la lasta jaro ĝis 75. Bedaŭrinde, nur pri la novaj membroj, kiuj uzis la novan aliĝilon, HEF havas ĉiujn bankinformojn kompletaj kaj seneraraj. De la pli malnova anaro HEF havas ankoraŭ nekompletajn kaj eĉ misajn bankinformojn, kio kaŭzis ĝenojn dum la pasinta jaro. Tial, interkonsente kun la kasisto, oni prokrastis la enspezon de la perbankaj kotizoj ĉi-jaraj (kaj kelkaj 1994-aj) ĝis definitiva ĝustigo de la informoj. Por tion atingi oni postsomere cirkuleros formularon al ĉiuj kiuj iam pagis per banko.

### Kongreso kaj aliaj aranĝoj

En Malago okazis la 53a HEF-kongreso, de la 16a ĝis la 21a de julio. Danke al la engaĝiĝo de junaj valoroj, daŭre strebantaj por modernigi la HEF-strukturojn, la kongreson de Malago oni difinis kiel tiun de la LABORO kaj EFIKO.

Kontribuis al la ĝusta disvolviĝo de la laboro, la antaŭkongresa planado, kiu provizis la laborkomisionojn je ideoj, sugestoj kaj efektivaj proponoj venintaj el la diversaj hispanaj Esperantaj Grupoj mem, kiuj volis tiel partopreni en la komuna tasko. Cetere, la OKK sciis elekti adekvatan kongresejon: "Centro Cívico", ampleksa konstruaĵo provizita per dormoĉambroj, komuna manĝejo kaj bonaj salonoj por la debatoj.

Laŭ la peto de la kongreso, jam antaŭ la fino de la jaro, s-ro Miguel Gutiérrez pretigis ampleksan dokumenton pri la aranĝado de kongresoj.

Aliflanke, okazis en nia lando aliaj tre interesaj kulturaj aranĝoj kiaj la dua Internaciaj Kultura kaj Turisma Semajno, la 15a Hispana-Franca Renkontiĝo, ktp.

### Periodaĵoj

Boletín plu aperadis regule. Ekde la numero 317 ĝi havas 32 paĝojn, 4 pliajn! Kaj tamen la preskosto malpliiĝis! Ĉu miraklo? Ne, tute ne. Tio okazis danke al la daŭra kaj senlaca strebado de la ĉefredaktoro, s-ro Antonio Marco Botella. "Guto post guto konstante frapante...".

Kiel interkonsentite en la malaga HEF-kongreso, nia aktiva samideano s-ro Andrés Martín komencis akurate kaj regule kunlabori en Boletín pri aplikado de esperanto en komerco kaj ekonomio ekde la numero aperinta en septembro.

Ankaŭ endas mencii la «katalogon» ofertitan de la Libroservo, ĉar ĝi fariĝis regule aperanta informilo tre taŭga por la disvolviĝo de la E-kulturo en nia lando.

### Libroservo

La Libroservo de HEF daŭre tenas sian bonan nivelon de funkciado, ofertante al la hispanaj esperantistoj ĉiam pli ampleksan liston

de libroj, diskoj kasedoj ktp., pere de interesa katalogo en kiu eblas trovi allogaj ofertoj. (Vidu ĝian spez-konton sur la 7a paĝo).

### INFORMADO

Laŭlonge de la jaro okazis diversaj konferencoj kaj prezentoj de la lingvo en kelkaj regionoj, foje kun reeĥo en la ĵurnaloj, radio kaj eĉ televizio: Alquerias, kun ekspozicio, Barcelono kaj Reus (KAE), Santander, Zaragoza; ankaŭ surstrataj kaj foiraj elmontroj pere de standoj (Sant Cugat), ktp.

Provizore falis la nombro de petitaj informoj en la HEF-oficejo pro la preskaŭa ĉeso de regula propagando kaj informado al la amaskomunikiloj dum pluraj monatoj. Rimarkindas tamen, ke novaj tre junaj homoj komencis kontakti la Federacion uzante «komputilretojn». Ili interesiĝis pri esperanto unuafoje renkontinte ĝin en tiu medio. Tio eblis graŭ la agado de nia nova juna ano Héctor Barca, kiu en Galegujo zorgas esperanto-rondon en komputila bultenejo, kaj tre kompetente helpas en kontakto kun la HEF-oficejo kunigi la tiumedian agadon por esperanto faratan de aliaj junaj esperantistoj. Nu, laŭ peto de la HEF-estraro, Héctor Barca laboros pri komputila bultenejo por HEF.

### KULTURO

La HEF-biblioteko, kiu troviĝas en la HEF-oficejo, pligrandiĝis regule per alveno de libroj kaj periodaĵoj. Pri la novaj libroj oni komencis informi la anaron per Boletín. Ne eblis en ĉi tiu jaro plu enkomputiligi la librojn, kvankam iom pli ol 700 (el preskaŭ 1.000) estas jam delonge registritaj. La kolekton de periodaĵoj komencis tre zorge ordigi kaj entekigi la juna kunlaboranto Juan Antonio Sánchez.

Aperis pluraj libroj de la eldonejo «Pro Esperanto» en kunlaboro kun Fundación Esperanto de HEF.

Multaj grupoj, kaj eĉ soluloj! celebris, la 15an de decembro, la tagon de Zamenhof, t.e. la *tago de la esperanta libro*. Tiu tradicia festo jam de jaroj estas motivo por renkontiĝo de ĉiuj membroj de la diversaj grupoj, kaj vigligo de la respektivaj asocioj.

[daŭrigo sur paĝo 32]

---

### ☞ MALĜOJA NOVAĴO

La tuta HEF-estraro montras sian triston pro la forpaso de du eminentaj esperantistoj: la vicprezidanto de la Akademio, s-ro Jean Thierry, kaj la fama verkisto kaj eseisto, Karolo Piĉ, kiu tamen postlasas abundan ankoraŭ ne eldonitan verkaron.

---



# Viglas la movado

### Alquerias (Murcio)

La 29an kaj 30an de pasinta aprilo okazis en la sidejo de Kultura E-Asocio "Ĉielarko" de tiu Murcia urbo la 6an Kongreson de Valencia-Murcia E-Federacio.

La unuan tagon kunvenis pluraj Murciaj E-Asocioj por debati pri la internaj problemoj de la Grupoj, kaj ankaŭ kiel kunlabori kun la Grupo "Ĉielarko", de Alquerías, en la organizado de la venontjara Hispana Kongreso de Esperanto, okazonta en Murcio. Vespere, okazis la protokola malfermo de la kongreso, kun partopreno de lokaj aŭtoritatoj kaj reprezentantoj de la Grupoj apartenantaj al la Federacio. Sekvis kanto-recitalo en la esperanta kaj hispana lingvoj fare de profesorino Inma Martí.

Dimanĉon matene okazis, unue, ekzameno de lernantoj de Elementa Kurso kaj tuj poste laborkunveno, en kiu oni analizis la problemojn de la Federacio. Specialan atenton meritis du temoj, nome, la lernolibroj uzataj en la E-kursoj kaj kiel solvi la problemon de la E-supersignoj en la komputilo. En ambaŭ debatoj, pli ol atingo de definitivaj konkludoj, oni eltiris utilajn sciojn pri ĉiu sistemo libere aplikata de ĉiu debatinto. Fine, oni ricevis proponon por okazigi la venontan Federacian kongreson en urbo, kies konfirmon oni devos peti al la koncerna estraro.

La komuna manĝo de la kongresanoj okazis en Murcia restoracio, en tute amika etoso, kaj je la fino, emociiga adiaŭo taŭgis kiel ĝenerala ĝisrevido de la kongresanoj.

### Fondo de E-Klubo "Papilio".

La 28an de pasinta aprilo estis fondita E-klubo "Papilio" en Kaunas, (Litovio), kies sidejo estas la domo de A. Zilbernik (bopatro de Zamenhof), kie ĉiuĵaŭde kunsidas la esperantistoj de tiu urbo kaj de nun viglas atentinda esperantista aktivado.

Litova E-Asocio petas al la esperantistoj el la tuta mondo bonv. sendi esperantaĵojn (librojn, gazetojn, sonbendojn k.a.) por la biblioteko kaj por la Muzeo "Klara Zilbernik" jam en preparo. Adreso: Esperanta Klubo "Papilio" (Litova E-Asocio) a.d. 167, LT-3000 KAUNAS. Litovio.

## Oni serĉas Eldonejon

Bruno Vogelmann, Honora Membro de UEA, aŭtoro de la verko *La Nova Realismo*, nun tradukita en hispanan lingvon kun la titolo *El Nuevo Realismo*, serĉas Eldonejon. Financa kontribuo estas ebla. Bonvolu informi la aŭtoron: Bruno Vogelmann, pk. 1463.
D-74555 Crailsheim. Germanio.

Pri la verko, nun tradukita je 17 naciaj lingvoj, opiniis siatempe D-ro Juan Régulo Pérez:

«...mi ne scias, kion admiri pli: la enhavon aŭ la lingvon! Rare, preskaŭ neniam mi tenis en miaj manoj tian libron... mi legis, legis denove. Resume, vi kreis grandiozan verkon, precipe rilate la enhavon, sed ankaŭ la majstradon de la lingvo».

## Festivalo en Verono (Italio)

La Esperantista Grupo de Verono aranĝos en junio 1996 Internacian Esperanto-Festivalon okazontan en tiu urbo pri la temo «Universaleco de la legendo de Julieta kaj Romeo

**BELARTAJ KONKURSOJ 1995**

**Poezio**

1. Gonçalo Neves (Portugalio) pro "Kaŭkazo via";
2. Gonçalo Neves pro "Suda Pastoralo" kaj Krys Ungar (Britio) pro "Se unu pasero falos";
3. Ne aljuĝita.

Honora mencio: Gonçalo Neves pro "Pereo". Partoprenis 50 verkoj de 25 aŭtoroj el 17 landoj.

**Prozo**

1. Ulrich Becker (Germanio) pro "La Aĵoj kaj la ŝezonoj";
2. Liven Dek (Hispanio) pro "Marta kaj Maria";
3. Georgo Kamaĉo (Hispanio) pro "La venko"

Honora mencio: Ulrich Becker pro "Pereo" kaj István Ertl (Nederlando) pro "Plagiato". Partoprenis 29 verkoj de 22 aŭtoroj el 15 landoj.

**Eseo**

1. Premio "Luigi Minnaja": Kurisu Kei (Japanio) pro "Kiel Esperanto helpis al mi solvi enigmojn de "Riporto".
2. Alberto Garcia Fumero (Kubo) pro "Arkaika parolado en Esperanto" kaj Eva Tófalvi (Hungario) pro la "La du testamentoj de Sándor Szathmári;
3. Gonçalo Neves pro "La lirika itinero de Miguel Fernández"

Partoprenis 11 verkoj de 11 aŭtoroj el 10 landoj.

- Universaleco de la Internacia lingvo Esperanto».

En la kadro de interesa suka programo, la organizantoj ankaŭ anoncas lirikan esperantlingvan konkurson pri sama temo, al kiu povas partopreni esperantistoj el iu ajn lando per konkursaĵoj de 1 ĝis 3 poemoj, ĉiu en ses kopioj, el kiuj nur unu enhavu la nomon kaj adreson de la konkursanto. Limdato la 31a de decembro 1995.
Premioj: diplomoj, medaloj kaj senpaga restado en Verono dum la Festivalo.

## Pri solidara helpo

Esperanta rondo en Santiago de Cuba "Soldato de Esperanto" kun pli ol 350 membroj, el kiuj 200 gejunuloj, travivanta gravan ekonomian krizon, kiu serioze baras ĝian malvolvon, petas helpon al diversaj Esperanto-Grupoj el la tuta mondo kaj ĝenerale al ĉiuj geesperantistoj, ja al niaj samideanoj de tiu rondo mankas plej elementajn bezonojn por pluvivado: vestojn, nutraĵojn, medicinojn ktp. Ni speciale petas al la esperantistoj: lernolibrojn, paperon, bulkrajonojn, revuojn, krajonojn, kajerojn, legolibrojn ktp.

Bonvolu adresi vian solidaran helpon kaj leterojn al instruanto de la Grupo:
Pedro A. PEÑA MARTINEZ; Corona 163. San Mateo y San Antonio. CP 90100. SANTIAGO DE CUBA. (Cuba).

## Gratulon, samideanoj!

La ĵurio de la lastaj Belartaj Konkursoj de UEA aljuĝis al Gonçalo Neves unu honoran mencion, du unuajn premiojn en la branĉo poezio kaj la trian en la branco eseo. Ankaŭ du elstaraj hispanaj e-verkistoj Liven Dek kaj Georgo Kamaĉo ricevis la duan kaj trian premnioj respektive, en la branĉo prozo. Boletin ĝojas kaj fieras pri la sukcesoj de niaj karaj amikoj, kaj publike gratulas ilin pro ties merititasj laŭroj.

## Plia gratulo...

En la lasta voĉdonado por la perioda renovigo de triono de la Akademio de Esperanto elektiĝis interalie nia portugala samideano Gonçalo Neves, juna kaj talenta e-verkisto. Nu, jen plia junulo en la Akademio. Gratulon Gonçalo!

## R. Urueña prelegis en Tampereo

Kadre de la kongresa temo de la UK em Tampereo, la iama prezidantino de HEF, D-rino Rafaela Urueña, prelegis duonhore pri la temo "Ni la popoloj post 50 jaroj", enkondukante la problemaron de UN kaj studante la ŝanĝojn okazintajn en tiu organizaĵo, jen en la strukturo de la asocio, jen en la kerno mem de la internacia juro, finante per sugestoj rilate al la necesa revizio de la Ĉarto por aktualigi ĝin al la nuna tempo.

# Niaj financoj

Kvankam la solvo de niaj problemoj ne dependas ekskluzive de la mono, estas certe ke ĝia malmulteco bremsas la aktivulojn. Oni diras, ke mono ne havigas feliĉon al la homo, tamen la homo ne estas feliĉa se la mono mankas al li/ŝi. Io simila okazas en niaj asocioj, ĉu ne?

Finance, kiel funkcias niaj organizaĵoj? Laŭ miaj konoj pri la afero, kutime iliaj enspezoj devenas de la membrokotizoj, la vendado de esperantaĵoj kaj, tre malofte, de subvencioj. Evidentas ke, se al tio ni ne aldonus la senpagan laboradon de la estraroj kaj aliaj voluntuloj, la funkciado de la E-asocioj ne estus ebla. Kontraŭe, se la financa situacio pliboniĝus, ni povus propagandi la lingvon pli vaste, agadi pli efike kaj, rezulte de tio, pligrandigi nian realan influon en la socio.

Estas certe, ke ĝuste pro tio, pro la malabundo de mono, la agado de niaj aktivuloj estas pli valora kaj ŝatinda. Mi gratulas tiujn personojn kaj kuraĝigas ilin plu agadi. Tamen, unu estas la privataj meritoj de iu aktivulo, kaj alia estas la financa malforto de niaj grupoj kaj asocioj.


La socio atendas, ke ni pruvadu la taŭgecon de nia lingvo por enspezi monon. Aliflanke, ni ĉiuj scias pri la disfalo de la tradiciaj sociaj valoroj. Ĝisdatiĝu ni kaj strategiu laŭ nia celo disvastigi la aplikadon de E-o.

Memvideble, la mono ne falas de la ĉielo. La sorto de la Movado dependas de la personoj kiuj aktivas ene de ĝi. Por plibonigi ĝian financon mi proponas studi la eblecojn makleri, traduki kaj kunlabori kun vojaĝ- kaj turismagentejoj. Hodiaŭ, per tiaj agadoj, multaj samland-in-oj enspezas monon, kial ne fari la samon por E-o? Kial, se eble, ne aplikadi E-on en tiaj taskoj? Se al enspezoj devenantaj de tiuj agadoj, oni aldonus tiujn de la membrokotizoj kaj la vendado de esperantaĵoj, la ekonomia farteco de niaj organizaĵoj pliboniĝus okulfrape.

Kial, do, ne komenci? Kial ne pruvi al niaj amikoj, ke E-o utilas por enspezi monon *ankaŭ* por la Movado? Kial ne starigi akcie kooperativajn aŭ alispecajn entreprenojn kiuj subtenu finance niajn asociojn?

Ankoraŭfoje, memoru ke ni *fosas nian sulkon*. La junularon interesos E-o, se ni pruvas ke ĝi utilas por perlabori panon. Do, kial ne uzi profitcele la lingvon sine de niaj organizaĵoj?

*Andrés Martín*




## KOMERCAJ ANONCOJ POR APLIKADO DE ESPERANTO

### Diners Club

Uzi la servojn de «eksterlandaj» libroservoj ofte ne montriĝas tiel facila kiel oni deziras pro transpagaj problemoj, kaj la tro altaj bankokostoj. En la ĉiutaga komercadrilato ĉiam pli vaste oni uzas la kreditkartojn. La tre konata Esperanto-eldonejo kaj librovendejo *Kariljono*, Doomstraat 22. B-2510 Wilrijk, Belgio, telefono kaj fakso + 32 3 827 24 05 rompis la vicon, kaj akceptas plurajn kreditkartojn, kiel *Diners Club, VISA, Eurocard, Mastercard, American Express, Access, ktp*.

Por la posedantoj de tiuj kartoj, ne plu ekzistas transpagaj problemoj ankaŭ en Esperantio. Ja *Kariljono* estas unu el la plej grandaj E-librovendejoj, kie oni povas mendi librojn, video- kaj sonkasedojn, diskojn, ktp. Posedantoj de tiuj kredtkartoj simple sciigu per subskribita karto aŭ fakso ties numeron, validodaton kaj la nomon de la kreditkarto al: *Kariljono*, Doomstraat 22; B-2610 Wilrijk. Belgio. Tel. kaj Fakso + 32 3 827 24 05.

Mendu la katalogon de *Kariljono*. Ĝi kostas nur 300 BEF.

**Pollando**. *Oni serĉas kunlaboranton pri industriproduktoj.*

Oni serĉas kunlaboranton kapabla traduki anoncojn de produktivaj firmaoj por eventuala publikigo en diverslandaj ĵurnaloj. Absolute necesa informiĝi unue pri kostoj de anoncoj en popularaj ĵurnaloj, al kiu oni aldonos la koston de la anoncotraduko. La celo estas starigi Agentejon por informado pri industriaj bezonoj: provizo de maŝinopartoj, industriaj produktoj ktp. Laboro de tiuj kunlaboprantoj ne estos senpaga. Bonvolu adresi viajn leterojn al: J.Berczynski; Str. Prosta, 2. PL-05-075 Wesola k/ Warszawy. Pollando.

### Ĉapelilo 1.0

Komerce pretigita tekstoprilaborilo por Esperanto sur IBM kongruaj komputiloj (Vindozo 3.0). Skaleblaj tiparoj por ĉiuj aplikoj. Enkonduka prezo nur 200 germ. markoj plus ekspedo. Professional Consulting, s-ro Pejno Simono, Am Füllgarten 4, D-61250 Usingen. Germanio.

## KLAĈOJ

Onidire, en la venonta kongreso en Salou estos surprizoj.

Nu, ŝajnas ke ni ĝuos la prelegon prezentitan de Miguel Fernández en Pollando, inaŭguros novan Esperanto-straton, kaj spektos la prezentadon de lernolibro por rapidaj, trimonataj, kursoj, kaj... se vi havas komputilon, venu kun du diskedoj, ĉar ni havas **bonegan donacon** por vi! kaj se vi volas pli, venu kaj vidu!




**HEF** **91-446-80-79**

**24 horojn tage, respondile kaj faksile**

# ... kaj viglas plu

★ La eldonejo *Pro Esperanto* en kunlaboro kun *Fundación Esperanto* de HEF eldonas plu. Ĵus aperis du novaj volumoj el la belaspekta serio "Originala literaturo" *La maŝino kiu kriis*, unua volumo de plurvoluma rakontaro pri strangaj fenomenoj, verkitaj de diversaj konataj aŭtoroj, kaj *La dorsosako de Panjo Rut'*, rakontaro de Sandor J. Bako kaj Claude Pirón. Ankaŭ aperis legolibro por germanoj *Esperanto-lesebuch*, en kiu aperas hispana popola rakonteto reverkita de nia samideano s-ro Liven Dek.

Cetere la eldonejo, gvidata de la respondeculo de la Viena Esperanto-Muzeo, s-ro Herbert Mayer, anoncas la aperon de kelkaj novaj libroj kaj por la venota jaro... surpriza verko de hispana verkisto!



# Vi, ulo!

1. vi HEFanas
2. vi aĝas ĝis 30
3. sur via Boletín-etikedo printatas ne "JM" sed "XM"

Se vi plenumas la tri kondiĉojn, vi baldaŭ maltrafos ion tre interesan, kaj vi pentos eterne, aŭ freneziĝos subite. Vi tamen ankoraŭ havas tempeton kontakti la HEFejon telefone, faksile, poŝte aŭ ŝue kaj informi pri via nomo, naskiĝdato kaj telefonnumero. Ni ne plu avertos vin. Ne ploru poste.

## Helpu per frua aliĝo al la Kongreso!

**54a HK de Esperanto, c/ Font Nova 32, ES-08202 Sabadell**

## Reklamtarifo de Boletín

| | |
|---|---|
| Kvarona paĝo .... | 2.000 ESP |
| Duona paĝo ...... | 3.000 ESP |
| Tuta paĝo ....... | 5.000 ESP |

Pagoj: 1) HEF-konto ĉe UEA (hefb-m).


2) HEF-konto ĉe hispana ŝparkaso Caja Postal (0014011966).

## Libroservo de HEF

Petu senpage la katalogon

Bonan legadon!

**Libroservo de HEF**
**Apartado 119**
**47080 Valladolid**
**Tel: 983-26-00-86**




**Curso del Idioma Internacional**

# Esperanto

**Miguel Gutiérrez Adúriz**

40-hora kurso baldaŭ aperonta

# Sukcesa UK en Tampereo

La 80a Universaka Kongreso de Esperanto en Tampereo, Finnlando, (22-29.7.1995) havis 2.443 aliĝintojn el 68 landoj. Post la Jubilea kongreso en Varsovio nur la Viena kongreso en 1992 atingis pli altan kvanton de aliĝintoj.

La kongreso pritraktis la Kongresan temon *Ni la popoloj — unu mondo aŭ disaj eroj*, ligitan kun la 50a datreveno de la ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, en diversaj kunsidoj. En la fina Rezolucio la kongreso alte taksas la ĝisnunajn kontribuojn de la UN, sed esperas, ke la membroŝtatoj urĝe klopodos efikigi la agadon de la monda organizo por pace solvi konfliktojn, tutmondigi la koncepton de la homaj rajtoj kaj konservi la vivmedion. Ankaŭ la Ĉarto de la UN estas laŭ la rezolucio aktualigenda, kaj la principon de senkondiĉa ŝtata suvereneco indas rekonsideri.

Dum la kongreso la Komitato de UEA elektis jam duafoje azian prezidanton por la Asocio. Kun grandega plimulto de la voĉoj elektiĝis la eminenta korea esperantisto profesoro d-ro *Lee Chong-Yeong*. La novan Estraron por la sama trijara oficperiodo eniris *Mark Fettes* (Kanado), *Amri Wandel* (Israelo), *Renée Triolle* (Francio), *Michela Lipari* (Italio), *Fred de Geus* (Nederlando) kaj *Povilas Jegorovas* (Litovio).

La Komitato kunsidis dum pli ol 20 horojn. El la komitataj decidoj la plej grava estis la akcepto de *Rumana Esperanto-Asocio* kaj *Unuiĝo Togolanda por Esperanto* kiel Landaj Asocioj de UEA. Kvankam la aliĝpeto de Kataluna Esperanto-Asocio ne povis esti akceptita, la komitato direktis peton al Hispana Esperanto-Federacio, ke la esperantistoj en Hispanio trovu manieron por ke ĉiuj aktivaj Esperanto-Asocioj tiulandaj estu reprezentataj en UEA.

En la Tago de la Lernejo oni pritraktis diversajn propedeŭtikajn projektojn. Aparte sukcesa estis la prezento de la finna eduksistemo. La Internacia Kongresa Universitato glate funkciis, unuafoje kunlabore kun la Akademio Internacia de la Sciencoj de San Marino.

Konstanta svarmejo en la kongresejo estis ties riĉa libroservo, kie prezentis siajn verkojn esperantaj aŭtoroj kaj tradukistoj, interalie *Majorie Boulton* (Britio), *Ivan Naumov* (Rusio), *Amri Wandel* (Israelo) kaj *Eduard V. Tvarozek* (Slovakio).

La franca firmao *Memory Access* demonstris la funkciadon de plurlingva Esperanto-instrua komputila laserdisko. Multajn allogis ankaŭ la vidbenda kurso de Esperanto *Mazi en Gondolando* de Internacia Esperanto-Instituto (Nederlando).

En la kultura programo de la Universala Kongreso aperis diversaj artistoj kiel la *Sankt-Peterburga Esperanto-teatro*, la aktorino *Jadwiga Gibczynska* (Pollando), la kanzonisto *Ĵak Le Puil* (Francio), la bardo *Miŝa Bronŝtejn* (Rusio), la rokbando *Persone*, la familiaj orkestroj *Asorti* (Litovio) kaj de *Castro* (Brazilo) kaj multaj aliaj.

La 80a UK aprobis en Tampereo jenan Kongresan Rezolucion:

**Universala Esperanto-Asocio,** salutante la 50-jaran jubileon de Unuiĝintaj Nacioj,

**diskutinte** pri la temo *Ni la popoloj: unu mondo aŭ disaj eroj?* kadre de sia 80a Universala Kongreso de Esperanto, kie kunvenis 2.443 kongresanoj el 68 landoj de ĉiuj kontinentoj,

**memorigante,** ke la Esperanto-movado laboras jam de pli ol unu jarcento por disvastigi konscion pri la homaj rajtoj, inkluzive de lingvaj rajtoj, kaj por estigi pacan interkompreniĝon inter la homoj de ĉiuj landoj,

**alte taksas** la kontribuojn de Unuiĝintaj Nacioj al la paca solvo de konfliktoj, al la tutmondigo de la koncepto pri homaj rajtoj, kaj al la konservado de la vivmedio,

**esperas,** ke per komuna kaj urĝa klopodo de la membroŝtatoj de UN tiaj agadoj fariĝos pli efikaj kaj rezultodonaj, interalie por ĉesigo de ĉiuj programoj por evoluigi armilojn de amasa detruado,

**substrekas** la nepran bezonon aktualigi la Ĉarton de UN por respondi al nuntempaj postuloj kaj aperontaj defioj, inkluzive ĝian demokratiigon kaj rekonsideron de la principo de senkondiĉa ŝtata suvereneco,

**alvokas** la membroŝtatojn de UN trovi vojon al pli rekta kaj egaleca partopreno de la popoloj en la debatoj kaj decidoj de la Organizo, kaj lige kun tio

**emfazas,** ke la lingvo Esperanto prezentas elstaran rimedon por tutmonda sendiskriminacia komunikado, je niveloj interŝtata, interpopola kaj interhoma, laŭ la celoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj en la spirito de la Ĉarto.

En la malferma ceremonio, la kongreson salutis la reprezentantoj el 51 landoj. En la nomo de Hispana Esperanto-Federacio salutis nia S-ano Don Juan Antonio Jimenez.

*Laŭ informoj el pluraj fontoj*

# Mi estis en Gdansko

**Impresoj pri la 14a ILF**

Reveno el Pollando. Madrido fajras: pli ol kvardek gradoj! Sed min karesas plu la frisko de la pasinta nokto varsovia, neforgesebla nokto de festo kaj amikeco kaj tilioj trans balkonaj balustradoj. Dankon, dankon, dankon, kara Ada Fighiera!

Varsovio estas verdo tranĉita de la vistula bluo. Kaj nebridebla emo al transviviĝo: la antikva kvartalo, fenikse renaskiĝinta el siaj cindroj — ve, la milita barbareco! — per enorma kunforto fizika, vola, ama. Same, la antikvan Gdanskon oni ŝton-sur-ŝtone rekonstruis el militruinoj. Kio do povus iam neniigi ĉi popolon?

En Gdansko ni, ĉirkaŭ tridek e-beletremuloj el naŭ landoj, parolis pri amo: 14a Internacia Literatura Forumo (*Amo en poezio kaj en prozo*). Ĉu ne tre magra nombro da homoj? Nu, sendube jes, sed nur se konsideri, ke la altan nivelon de la prelegoj kaj artaj prezentoj de mi spektitaj meritintus ĝui multe pli da — ĉiuj — bonaj gustumantoj de nia kulturo. Cetere, ĝuste ĉi neamasa partopreno generis etoson pleje taŭgan por interŝanĝo de literaturaj spertoj kaj zorgoj.

Aŭtenta sukceso. Ene de mi scintilas plu la poemoj de la polino Halina Poświatowska. Ŝian poetan staturon kaj personecon senvualigis Tomasz Chmielik, filologo, ĝisosta pasiigito de beletro, verva, vera sciofonto, esperantiginto de tridekkelkaj verkoj!... Ene de mi resonas plu la satena voĉo de Anjo Amika, kiu ĉe ĉiu modulado malkovras konstelacion de envolvaj sonoroj. (Kiam, Anjo, vi kantos al mi la *Habaneran*, de *Carmen*?) Ene de mi la *Anna* — perfekta — de William Auld kunvivas kun la *Anna* de Jerzy Fornal pro ties majstra enscenigo de la aulda poemo. Ja Fornal rompas la originalan skandon de la verso por krei propran draman kadencon — *Anna, diskrura kaj enua* — superban... Ene de mi remanencas la adiaŭa vespero aranĝita de la lokaj organizantoj. Elwira Twardowska — resumo de viv- kaj art-amo — surprizis nin kiel reĝisorino de neatendita spektaklo: belaj figuroj gejunulaj en ekzotaj vestoj, en muta ludado apud la publiko; sceneje, bela freŝtembra kantistino, bela dekoro surbaze de polineziaj elementoj;



postkulise, ensembla muzikado... Kaj ĉio, en kresĉendo ritma, luma kaj etosa: totala poezio.

En Gdansko (15a - 19a de julio) ni parolis pri amo. Verse kaj proze. Lertvorte Perla Martinelli gvidis nin en la universon de Boccaccio por prezenti la esperantigon de la unuaj tri tagoj de lia *Decameron*, iniciatitan de G. Waringhien kaj kompletigitan de ŝi mem. Giorgio Silfer pliafoje pruvis sian multflankan kompetenton kaj elokventon per pluraj publikigindaj enkondukoj al diversaj programeroj. La dramaturgo Ljubomir Trifonĉovski, baldaŭ transprenonta la LF-redaktorecon, prilumis la bulgaran alporton al la ĉeftemo. Sprite kaj amuze — ne am-uze — Valentin Melnikov pritraktis sian tradukon — *Kojonov Luĉjo* — de rusa popularerotika poemego. István Nemere selektis kaj komentis pecojn el nia amprozo... ... ...

En Gdansko ni eĉ kanzonis francguste — *Ne forlasu min* (Jadwiga Dzięlewska) — pri amo kaj senamo.

Min rilate, mi trovis tie la klimaton de intereso kaj spektemo, kia ebligas veran interfluon de sensacoj inter komunikemulo kaj la publiko. Dankon, forumanoj. Dankon, organizantoj. Ja via malavara invito donis al mi la ŝancon aktive partopreni tiun altflugan eventon kaj la honoron inaŭguri ĝin festprelege — *Mia lirika ama travivaĵo* —, diskonigi ankoraŭfoje la magian poezion de Lorca — *Sur la spuroj de F.G.L.* — kaj recitali kante kaj deklame, surbaze de mia poemaro *La profil' de viaj spuroj*. Dankon al vi, Judit Felszeghy, enkorpiĝo de sentivo kaj delikato, pro via mirinda partnerinado en ĉi lasta prezento.

En Gdansko ni forumis kun la koro lokita sur nia kultura specifeco, tamen aperta al la ekstera mondo. Kaj Gdansko reeĥis nian aferon afiŝe, radie, televide... Kaj varme bonvenigis nin en la renesanca Urbodomo de la Malnova Urbo per samepokaj — majestaj, belegaj — dancoj kaj kantoj. Kaj aliris nian kulturan realon kadre de suka kaj instrua renkontiĝo kun polaj verkistoj.

Jes, mi estis en Esperantujo kaj ankaŭ en Gdansko. Kunpromene sur la strato Mariacka, flankumita de marmoraj peronoj renesancaj, mi lasis min kapti de ĝia aero. Du junuloj fagotis. Ĉe la fundo, apud la Verda Pordego, viro violonis. Kaj la muziko elmagiis bunte vestitajn komercistojn surperone, belulinajn okulojn transfenestre... Tuta XVI-a jarcento alflugis tien. Poste ni enŝipiĝis: rivero Motława, ŝipfarejoj, ŝipegoj... Kaj la Balta Maro, ade milda, mediteranee neperturbebla. Eĉ tiam, sub ĉielo ĉiam pli nigranuba, kiu, tuj antaŭ nia albordiĝo ĉe la moleo en Sopot, regalis nin per pluvo kaj per mevoj. Resunis post la manĝo — bongustaj frititaj fiŝoj — en populara restoracio sur la plaĝo. Kaj la vespero transiĝis en brizon kaj promesojn. Tielis nia ekskurso!

En Gdansko ni parolis pri kundividita amo: beletro. En kaj eksterprograme. Memorindas multaj spontanaj besedoj ĝis malfrua nokto antaŭ botelo da rusa vodko — refoje bondezirojn, Valentin, pro via tridekokjariĝo! — aŭ bulgara blanka vino aŭ ruĝa *Rioja*... Kiom da bonaj vibroj!

Tielis mia 14a ILF. La 15a disvolviĝos venontjare en Hungario: *Esperanto-teatro*. Certe nemistrafenda okazo!

*Miguel Fernández*

---

**Observoj pri multlingveco kaj Esperanto en ĝi**

# Kiun lingvaron vi parolas?

### 1. Multlingveco kiel normala stato de la homaro

La homoj en naturaj kondiĉoj estis kaj ankoraŭ estas grandparte multlingvaj.

De kiam antikvaj triboj kaj popoletoj ekrenkontiĝis kaj kunlaboris aŭ kunbatalis, ili estis devigataj lerni la lingvojn de la aliaj. Se oni nur pensas pri la fenicaj komercistoj aŭ la multnaciaj armeoj de la greka kaj romia epoko, oni komprenas kial multaj lingvoj estis ĉiam samtempe utiligataj de la samaj homoj. Ekzemple, en la tempo de Kristo en Palestino estis utiligataj, certe malsamgrade kaj malsamkuntekste, minimume la aramea, la hebrea, la greka kaj la latina, tial ke nun eĉ por fakuloj estas malfacile diri kiun lingvon uzis Herodo (grek-ema reĝo) se li devis paroli kun Pilato (roma guberniestro) aŭ kiun lingvon uzis Kristo por debati pri religiaj temoj kun la hebreaj rabenoj. Fakte ili ĉiuj parolis kelkajn lingvojn, kaj la uzo de unu

aŭ alia dependis de la socilingvistikaj cirkonstancoj de la unuopa okazo.

La ideo ke principe homoj parolas nur unu lingvon, estas tre lastatempa ideo. Ĝi evoluis post la establiĝo de la grandaj naciaj regnoj en Eŭropo. Laŭ iu verkisto, la franca reĝo diris ne nur "L' état c' est moi" sed ankaŭ "La langue c' est la mienne". Praktike, la novaj suprenirantaj klasoj adoptis la lingvon de la kortego, por indiki per tio sian socian superecon, sian apartenon al la moderna kaj civiliza mondo, sian fremdecon disde la kamparanoj, kiuj ankoraŭ parolis siajn antaŭajn dialektojn.

De tiam antaŭeniris la ideo, ke ĉiu franco parolas la francan, ĉiu anglo la anglan, ktp. La lernejo estis metita je la servo de ĉi tiu ideo, kaj ĝi daŭre klopodis disvastigi la veran, ununuran lingvon, kiun teorie parolas, ekzemple, hispanoj aŭ kroatoj, kaj forviŝi ĉion alian. Bonŝance la sukceso de ĉi tiuj klopodoj estis minimumaj. Oni ja disvastigis la normajn, ŝtatajn lingvojn (almenaŭ en Eŭropo), sed oni ne sukcesis igi la homojn unulingvaj. Tamen ankoraŭ hodiaŭ ŝajnas al ni tute normale demandi: "Kiun lingvon vi parolas?" aŭ "Kiu estas via lingvo?" kaj atendi respondon, kiu rilatos al nur unu lingvo.

En la realo ĉiu homo, krom malgranda malplimulto, parolas gamon de lingvoj. La lingvoj, kiun difinita homo parolas, ne estas ĉiuj sur la sama nivelo. Kelkaj estas konataj pli bone kaj kelkaj pli malbone. Kelkaj estas uzataj nur parole, ofte perfekte konataj, sed tute ne skribataj. Kelkaj aliaj estas uzataj nur skribe aŭ por pasiva legado (pensu pri kiom da sciencistoj tra la mondo legas kutime anglalingvajn artikolojn pri sia fako, sed ne kapablas parole demandi pri la plej proksima stacidomo). La samo validas en ĉiuj aziaj kaj afrikaj evolu-landoj, kie oni uzas, ekzemple, la araban por la preĝoj kaj aliaj religiaj ritoj, la svahilan en la bazaro, la lokan triban lingvon por rilati kun blankaj turistoj.

Do, renkontante iun ajn oni devus vere demandi: "Kiun lingvaron vi parolas?", kaj atendi multoblan respondon.

### 2. Sinteno pri multlingveco en la mondo

Mi jam diris en la antaŭa ĉapitreto pri la sinteno de eŭropaj kleruloj al multlingveco en la lastaj jarcentoj. Ne estas ĉi tie la spaco por doni konkretajn ekzemplojn, sed ĉiuj el propraj lernejaj spertoj povas trovi ilin.

En aliaj kulturaj tradicioj la sintenoj variis, sed kutime estis multe pli liberalaj. Vi certe malfacile povos akcepti tion, sed la turka imperio (kiu en Eŭropo estis prezentita kiel sinonimo de barbareco kaj despoteco) estis multe malpli despota ĉirilate ol la dana reĝo en siaj norvegaj provincoj.

En ĉi tiu jarcento lingvo-scienco asertis sian sciencecon kaj lingvistoj

ekinteresiĝis pri pluraj aspektoj de lingvouzado, inkluzive de la psiĥologiaj kaj sociaj aspektoj. Kiam ili ekinteresiĝis pri dulingveco, ilia juĝo estis ĝenerale negativa. Estas konata en socilingvistaj rondoj la Internacia *Konferenco pri Dulingveco kaj Edukado* okazinta en Luksemburgo en la jaro 1928a, kiun partoprenis la ĉefaj lingvistoj kaj edukistoj de tiu epoko. Ĉi tiu konferenco okazis sen samtempa interpretado. Ĉiu rajtis paroli en la angla, en la franca, en la germana, en la itala aŭ (interese por ni) en Esperanto, sed li devis mem kompreni la alparolojn de aliaj, kiujn neniu tradukis. La laboroj bone disvolviĝis, ĉar ĉiuj partoprenantoj estis multlingvaj (kion oni atendas de famaj lingvistoj). Sed la surprizo kuŝas en la konkludoj. Ĉi tiu aro da multlinguloj konkludis ke multlingveco estas tre danĝera fenomeno, ke multlingvaj infanoj prezentas psiĥajn problemojn kaj ke ĉiukaze multlingveco ĝenas ilian normalan lernejan progreson, ktp.

Ankaŭ en Usono, kiam regis la mito pri la granda fandujo de alvenintaj enmigrintoj, oni trovis ke dulingvaj infanoj estas intelekte malsuperaj.

Oni devas atendi la 60ajn jarojn por havi ĝeneralan ŝanĝon de la sinteno, almenaŭ en universitatoj kvankam ankoraŭ ne en lernejoj. Jam UNESKO iusence montris la vojon, kiam ĝiaj fakulaj kunvenoj asertis ke la uzo de la lokaj lingvoj en la unuaj instru-fazoj estas avantaĝaj por la infanoj. Kaj poste la ĉefa ondo de la nova pozitiva pritakso de dulingveco komenciĝis en Kanado, sed nun ĝi fariĝis ĝenerala. En pluraj landoj oni komencis programojn por dulingva edukado de alilingvaj infanoj. Multo estis farita tiurilate en Norda Eŭropo kaj aparte en Svedujo. Dulingvaj familioj estis instigataj flegi la plurlingvecon en la familio pro la psiĥaj avantaĝoj de ĉiuj membroj de ĝi. Kaj ĉie en la mondo esploristoj komencis trovi favorajn kunligojn inter dulingveco kaj aliaj indikiloj pri la inteligento, lerteco, ktp. Tio estas, interkrampe, plua pruvo pri tio, ke en sociaj sciencoj ofte oni trovas la respondojn, kiujn oni serĉas.


### 3. La familio, kaj la unua socia medio kiel portanto de natura multlingveco.

Oni aparte insistas lastatempe pri tio, ke lingvojn oni lernu nature kiam oni estas tre juna. Plurlingva familio kaj plurlingva medio estas por tio la plej bona kondiĉo. Esence oni diras, ke se vi havas patron kaj patrinon, kiuj parolas malsamajn lingvojn, la plej bona afero por fari estas instrui al la infano samtempe la du lingvojn por ke li iĝu personece ekvilibra (ĉar neniu el liaj du duonoj estas perceptata kiel malpli valora) kaj lingve komforta en ambaŭ medioj.

Aŭ, se vi loĝas en Turkujo, estas senutile malhelpi la infanon lerni turkan. Li ĉiukaze lernos ĝin de aliaj infanoj en la strato, kaj vi nur kaŭzos problemojn pro via sinteno al la turka lingvo (kaj, implice, al turkoj).

La problemo pri multlingvaj familioj iĝas ĉiam pli granda pro la grandaj lastatempaj ekonomiaj migradoj.

En Usono, familioj kiuj uzas hejme la hispanan estas jam milionoj, sed neniu plu kontestas la rajton de la hispanlingvaj patrinoj uzi kun siaj infanoj la lingvon, en kiu ili povas esprimi sin pli bone. Eventuale la emfazo nun estas pri lernado ankaŭ de la angla, kiun ĉiukaze nuntempe pro la proporcio de anglalingvanoj en Usono ankoraŭ ne estas en danĝero (kiel kelkaj timas). En okcidenta Eŭropo malgraŭ miliardoj da liroj, frankoj, markoj, ktp. elspezataj en lernejoj por lernigi la anglan, tamen oni en la stratoj de Roterdamo aŭ de Munkeno, de Marsejlo aŭ Romo oni povas daŭre aŭdi la araban. Kaj la portantoj de ĉi tiuj lingvoj estas ĉefe familioj kaj sametnaj najbaraj grupoj.



Aliflanke, ĉiuj tiuj parolantoj de la araba ankaŭ lernas la lokajn eŭropajn lingvojn en tute natura maniero de la ĉirkaŭa socio.

## 4. La esperantlingva familio

En ĉi tiu kunteksto la esperantlingva familio trovas pli da kuraĝigoj por transdoni Esperanton nature al siaj infanoj.

Kvankam esperantistoj malgrandskale ĉiam faris tion, nun ili povas trovi en la pli vasta socio teorion, kiu favoras tion, kaj praktikajn ekzemplojn pri tio en sia ĉirkaŭaĵo. Se estas bone paroli turke kaj germane, kial estus malbone paroli esperante kaj germane?

Aliflanke ĉiuj psiĥaj avantaĝoj de turka infano en Germanujo, kiu povas paroli ankaŭ la turkan kaj do esti parto ankaŭ de la turka komunumo, validas ankaŭ por Esperanto-parolantoj. Por ĉiuj esperantistoj la esperantlingva komunumo, ties idearo, ties agadoj, ties ritoj, ties kongresoj, ktp. estas integra parto de la vivo kaj de la personeco. Se oni ne transdonas la lingvon al siaj infanoj oni intence tranĉas ilin de tiu komunumo. La infano neniam povos plene kompreni gravan parton de la vivo de siaj gepatroj, neniam estos almenaŭ komprenanto de parto de siaj "radikoj". Esperantista familio, kiu ne transdonas Esperanton al siaj infanoj riskas produkti neekvilibrajn homojn, kiuj iel en la menso havos nigran truon pri tiu mistera parto de la gepatroj, en kiun oni ne permesis al ili eniri.

*Renato Corsetti*

**Bibliografio**

Ne estas oportune pro spaco-konsideroj listigi ĉiujn lastatempajn verkojn pri dulingveco. Tamen ĝenerala historio pri la ideoj rilate al dulingveco kaj vasta bibliografio estas trovebla en Félix Etxeberria Balerdi (1994) *Educación y bilingüismo*, San Sebastian. Facultad de Filosofía y Ciencia.

# Identiga ludo

## pri la Esperanta historio de hispana urbo

**KVIZO**

Ĉu vi povas, surbaze de la sekvaj informoj identigi la hispanan urbon, kiu rolis en la historio de la landa Esperanto-movado?

1. Agadoj por Esperanto komenciĝis en 1909, kiam Trinidad Soriano Hidalgo esperantistiĝis. Li fondis la lokan grupon kaj prezidis ĝin dum dek sinsekvaj jaroj. En 1910 li komencis gvidi kursojn, kaj en 1917 fondis la regionan Esperantistan Federacion.

2. En 1911 la tieaj esperantistoj starigis budon dum la aprila foiro por propagandi Esperanton. Estis fondita la esperantista rondo *El Arahal*, kies prezidanto estis Jozefo Soriano. Rafael Fiol Paredes, kuracisto kaj generalo-inspektoro pri sano, kiu esperantistiĝis en 1910, fariĝis la prezidanto de la urba esperantista grupo en 1933.

3. En la salonoj de la Ekonomia Societo de la urbo estis organizitaj tri novaj kursoj en 1915. Trinidad Soriano gvidis la kurson por komencantoj, kaj Joaquín Machuca kaj Carmen H. Santaolalla instruis Esperanton al mezgradaj lernantoj kaj virinoj respektive.

4. En la sama urbo en 1916 la Komitato de la Hispana Societo por Propagando de Esperanto (fondita en 1903) malfondis ĝin pro manko de kandidatoj. La lasta prezidanto estis Trinidad Soriano.

5. Post kiam Trinidad Soriano mortis en 1920, la pionira esperantisto José Garzón Ruiz aktivis por revivigi la regionan organizaĵon. En 1922 li kunvokis reprezentantojn de la diversaj provincoj al kunveno, kiu okazis en tiu ĉi urbo. La rezulto estis restarigo de la Federacio.

6. Esperantistoj vizitis la urbon post du kongresoj. La unua estis la 5a Hispana Kongreso de Esperanto (la 3a Iberia Kongreso) en 1925. En la jaro 1959, post la 20-a Hispana Kongreso de Esperanto, okazis eksterprograma postkongresa vizito.

7. La urbo gastis du Hispanajn Kongresojn de Esperanto:la 7an en 1928 kaj la 44an en 1984.

8. La vivo en tiu ĉi urbo estas priskribita en la romano **Sango kaj Sablo** de la valencia aŭtoro Vicente Blasco Ibáñez, esperantigita de Ramón de Salas y Bonal el Zaragozo kaj eldonita en 1935 de Aragona Esperantista Federacio.

9. Dank' al la persista strebado de Felipe González del Pino kunlabore kun Antolin Colmenar River, ekfunkciis en la jaro 1976 ĉe strato Sol 75, la urba "Akademio de Esperanto".

10. En 1985 okazis en tiu ĉi urbo la 3a Andaluzia Kongreso de Esperanto.

*Bernard GOLDEN*

ATENTU!

La Redakcio de "Boletín" gratulas al nia kunlaboranto Bernard Golden pro lia trafa ideolernigi historion de Esperanto per simpla ludo. Per la supra artikolo, la esperantistoj de grava hispana urbo, lude-ludanta, eblas lerni la Esperanto-historion de sia urbo. Ĉi-kaze ni povas certigi, ke s-ro Golden saĝe skizis per esperantistaj eventoj la profilon de la koncerna urbo.

Por daŭrigi tiun didaktan taskon, estas dezirinde, ke, imitante ĉi tiun artikol-verkanton, hispanaj esperantistoj skizu per propraj artikoloj la Esperanto-historion de sia respektivaj urboj.

La Esperanta Societo "FRATECO" de Zaragozo dezirante kunlabori kun la celo de s-ro Golden kaj la Redakcio de "Boletín" en tiu instrua tasko *donacos E-an poem-libron* al ĉiu konkursanto kiu identigos la hispanan urbon per la informoj indikitaj en la supra artikolo, kun unu sola kondiĉo *aldoni unu solan plian eventon* ne aperanta en ĝi. Leteroj kun solvoj al la Redaktejo.

*La Redakcio*

# Literatura konkurso
## de
## Fundación Esperanto

La patronaro de la Fundación Esperanto decidis, en kunsido okazinta la 22an de marto de 1995, organizi tradukan literaturan konkurson sub la nomo "**Premio Inés Gastón**" al plej bona esperanta traduko el novelo (rakonto) de hispana aŭtoro vivanta en la 20a jarcento. Vidu la regularon en Boletín n-ro 320, 32a paĝo.



# Recenzoj

**Premiera antologio en E-o**
**pri hispana-araba-hebrea liriko.**


MARCO BOTELLA, Antonio. *Lirikaj perloj de Al-Andalus*. 327 pĝ. 15 x 21 cms. Eld. Fundación Esperanto, C/San Vicente de Paul, 1. Zaragoza (Hispanio). Ilustrita per dek fotoj de hispana-araba-judaj artohistoriaj monumentoj, kaj dek delikate belaj desegnaĵoj de arto hispana-araba. Prezo 1.900 ptoj (25 ngld. + poŝto). Mendoj al: Libro-Servo de HEF. Apartado 119. ES-47080 Valladolid.

La plurkolora kovrilo prezentas simbolojn de la tri plej gravaj homaj kolektivoj tiam loĝantaj en Al-Andalus (Iberio): hispanoj, araboj kaj judoj. La libro enhavas dudek ĉapitrojn: de la ekregado de la emiro Abd al Rahman la la en la jaro 756 (unua elstara poeto de Al-Andalus) ĝis la regnofino de Granado en 1492. Ĉiu el tiuj ĉapitroj pritraktas specifan temon, kiuj neniel interrompas la rigoran kronologian ordon de la rakontado, aŭ la eksponomalvolvon de la lirika antologio, tute kontraŭe, la priskribo de biografioj kaj ties poemoj, flue aperas en la sceno de la vivo sur la fono de sia respektiva tempo, paralele kun la komentoj pri ĉiu evento politika aŭ socia okazanta en tiu konstante ŝanĝiĝanta socio, en kiu la penso de filozofoj kaj la rolo de sciencistoj kaj poetoj tiom influis en la ĉiutaga vivo.

Emanas el la libro certa etoso legenda kaj romantika, pli proksima al fabela orientstila romano ol al rigora priskribado de lirika antologio: Ĉarmas, la rakontoj pri tiuj renkontiĝoj en la palac-korto de la bela poetino Wallada, kie oni konversaciis pri amo kaj poezio, kaj ne malofte, la princino recitis siajn poemojn dum steloj scintilis sur la Kordova firmamento... aŭ la recitaloj de poemoj kaj muziko de Ziryad "la nigra birdo", kiuj revoluciis la lirikajn mediojn de la unika Kordovo. Sorĉas, la priskribo de tiuj dumnoktaj festoj de kanto kaj poezio, sur ŝipetoj navigantaj sur akvoj de riveroj Ebro aŭ Gvaldalkiviro, verŝajne en tiu epoko tre oftaj...En alia aspekto impresas la duraj scenoj de al-Mutamid, granda poeto kaj reĝo, kantanta per versoj neforgeseblaj la rigoron de la ĉenoj, kiam en la prizono de Agmat li elvokas siajn gefilojn kaj la amatan Sevilon. Epikaj scenoj, filozofio kaj mistiko en viveroj de Ibn Arabi, Ibn Hazm aŭ Avempaco, pasiaj idilioj, amo kaj poezio en ĉiu angulo de la libro, kvazaŭ temus pri romano kaj ne de reala vivo, kiun

oni nun eltiras el antikvaj manuskriptoj, el kiuj multaj restas ankoraŭ ne tradukitaj...

Plaĉas legi en unu el tiuj ĉapitroj, kiel naskiĝas kaj floras la popola poezio en Al-Andalus, kiel profunda estis en tiu popolo amo al sciencoj kaj precipe al poezio, kio firmigas la ĝeneralan konvinkon kaj tiaman diron: "simpla kamparano perfekte scipovas verki poemon". Cetere, enorme surprizas la leganton, la rolo de la tiuepoka virino en socio muzulmana: la aŭtoro de la verko prezentas longan ĉapitron menciantan multajn poetinojn kun iliaj respektivaj poemoj, kiel pruvo nekontestebla, ke ili ekzistis, kaj tiu nekredebla realiĝo estas konstatebla ne nur en tiu ĉi libro, sed ankaŭ en manuskriptoj ekzistantaj jam tradukitaj; tio do ne fruktis kiel romaneska fantazio en la menso de la verkinto. Allogas la paĝoj spegulantaj viverojn en la tajforegnoj de Sevilo, Almerio, Valencio, Saraqusto, Badajozo, Granado...



La ĉapitro pri la hebrea profana poezio, naskiĝinta en Al-Andalus kaj prezentita de la verkinto per kvar eksterordinaraj poetoj, apenaŭ skizas la aŭtentan dimension kaj poeziajn valorojn de tiu giganta kvaropo, Ibn Nagrella, Ibn Gabîröl, Moŝe ibn Ezra kaj Yêhuda ha-Levi. Tiu ĉapitro, simile al tiu apartenanta al la zenita periodo de la kalifejo de Kordovo kun ties grandaj poetoj: Ibn Suhayd, Ibn Zaydun kaj Ibn Hazm, kaj aliaj el la libro, postulas nepran verkadon ĉiukaze de monografioj en Esperanto, kun pli ampleksaj eksplikoj pri viveroj, kompletaj poemoj, analizo kaj kritiko de ĉiu verko, ktp.

Kiu estas la plej granda merito de la nova libro? Miaopinie la plej granda merito de la verko kuŝas en la originala ekspono de la temaro. Pri ĝi, mi abunde legis verkojn en la hispana, franca, germana, angla kaj araba lingvoj, sed normale temas pri monografioj, kaj kiam la verko ampleksas antologian kategorion, en tiuj kazoj mi ne trovis la saĝan kombinon de elementoj historiaj, biografiaj, politiko-sociaj kaj precipe la rakontado de anekdotoj,

kiujn s-ro Marco prudente kaj saĝe miksis kaj uzis en la ekspono kiuj faras ĝin eksterordinare alloga. Tiu sistemo ebligas tuj percepti, ne nur viverojn de reala ekzisto ĉiutaga, sed ankaŭ en kiaj etoso kaj cirkonstancoj vivis la biografiitoj kaj tial kiel la medio influis en iliaj poemoj.

Ankaŭ diskuteblaj interpretoj kaj prilingvaj eraroj ekzistas en la verko: debatinda la decido versigi la araban lingvan poezion kaj enkorsetigi ĝin per la fremda vesto de la hispana oksilaba antikva versoformo, la romanco, kaj en poemoj kun longaj versoperiodoj, per la pli primitiva deksessilaba romanco. Pro tio ŝajnas speciale dankinda la opiniŝanĝo de la verkinto, kiam li prezentas moaŝahojn kaj zegelojn laŭ la originalaj propraj reguloj. Unu sola poemo aperas per la versoformo *rompita piedo*, post ekspliko de la tradukinto, kies decidon mi komprenas kaj respektas. Diskutinda ankaŭ la esperantigo de certaj arabaj terminoj, plejofte en funkcio de la fonetiko, sed ĉiukaze atendante opiniojn kaj konfirmojn definitivajn de plej kompetentaj erudiciuloj pri la temo, speciale de arabaj esperantistaj profesoroj. Niaj legantoj perfekte komprenas, ke la verko postulis esploradon, pripensadon kaj decidojn neniam facilajn, ja oni ne povas forgesi, ke ni pritraktas historiajn eventojn, lirikajn regulojn, vivokonceptojn de la mezepoko, kiuj eldevigas ĉiukaze grandan imagokapablon por interpreto kaj kompreno...



Resume, honeste pensante, mi rekomendas atentan legadon de la libro. Malgraŭ ĝiaj mankoj kaj eventualaj eraroj, (neeviteblaj en tiel malfacila tasko) mia konkludo estas pozitiva: ĉar la verko meritas, miaoponie, iom pli ol aprobon, kaj certe ĝi riĉigas la Esperantan literaturon. Nun la enigmo estas, ĉu la eventuala sukceso de la verko sufiĉos por malfermi la pordojn al estonta serio de novaj verkoj en Esperanto pri tiu studinda alloga epoko, kun neimagebla repertuaro de temoj filozofiaj, mistikaj, lirikaj, amaj, ktp. de la tiuepokaj intelektaj gigantoj Avempaco, Averroeso, Majmonido, Ibn Arabi, Ibn Hazm, Gabîröl kaj longega listo de tiaj figuroj de grandaj pensantoj, nun preskaŭ tute forgesitaj... La potenciala disvastiginda intelekta materialo estas neimageble impona!

Estas malfacile kompreni, ke oni dum pluraj jarcentoj ne verkis la historion aŭ komentis la plej belan poezion, la plej elektindan filozofion, la plej gravan kulturon de Okcidento de tuta epoko... Kun optimismo ni esperas la plej bonan!

*Nicolás López Escartín*
*Ĉefredaktoro de Boletín (1963-1966)*



# Survoje al universala civilizacio

Giordano Moya
Barcelona Esperanto-Centro 1995
Kovrilpaĝo Miguel Gutiérrez Adúriz
Mendebla ĉe Libroservo de HEF.
206 paĝoj. Prezo: 1300 ptoj.

Eldonita de Barcelona Esperanto-Centro aperis tiu ĉi esearo, kies enhavo, ĉiam en la penslinio de la antaŭaj verkoj de la aŭtoro, volas konduki nin al la malkovro de la historiaj eventoj kaj faktoroj, kiuj daŭre malebligas la atingon de la paco.

Per diversaj ĉapitroj kaj historiaj okazintaĵoj, la aŭtoro detale studas la kialojn kaj konsekvencojn de la socia evoluo, montrante sin persono, kiu bone konas la historion, kaj kies pensoj certe aperos ŝokaj por multaj el niaj vivkonceptoj.

Tiel, komencante de la radikoj (*la naturo de la naturo, de la vivo, de la homo, de la socio*), li iras al la disvolviĝo de la historio ekde la neolitiko ĝis la nuna epoko, por studi poste *la naturajn kaj kulturajn faktorojn en la evoluo de la socio.*

La 4a ĉapitro temas pri studo de la nunaj problemoj de nia mondo, por konduki nin al la lasta ĉapitro (*mondunuiĝo — homarunuiĝo*), ligite al alia verko de la aŭtoro: "Esperanto en prospektivo". En ĝi li konkludas, ke nur la koncepto pri homaranismo helpos nin atingi veran universalecon. Sed la mondo ankoraŭ restas survoje al tiu dezirata universala civilizacio, ĉar necesas sanĝi la pasintajn konceptojn pri civilizacio, kulturo kaj pensado, kaj tio estas malfacila kaj longdaŭra.

Per Esperanto oni povas atingi tiun universalan identecon, kaj certe la esperantismo povas grave roli por sukcesigi tutmondan socian kunvivadon.

Ni gratulas la aŭtoron kaj la eldoniston pro la apero de ĉi tiu pensiga libro, kiu certe plaĉos ne nur al la filozofiamantoj, sed ankaŭ al ĉiu esperantisto deziranta koni novan koncepton pri la vivo mem. La libro, bone bindita kaj kun altira kovrilo, estis oficiale prezentita al la internacia publiko en la 80a UK en Tampereo, kaj ĝi estos prezentata al la hispana movado en la kongreso de Salou.

*M. R. Urueña*

**Instruado**

La manko de vere taŭgaj, kompetente verkitaj kaj moderne allogaj hispanlingvaj lernolibroj por kursoj kaj memlernantoj estas grava baro en la disvastiĝo de esperanto en Hispanujo de antaŭ jaroj. El la malmultaj elektebloj, sendube elstaras kvalite la veterana libro de Fernando de Diego, kiu tamen de ĉiam montriĝis ne facile alirebla por la plimulto el la komencantoj.

Por tion solvi, jam de longe kelkaj tre kompetentaj HEF-anoj laboras pri lernolibroj: Antonio Alonso Núñez, Miguel Gutiérrez Adúriz kaj Antonio Valén. Dum la venonta HEF-kongreso, parto el la fruktoj de tiu penado estos prezentita al la esperantistoj: Miguel prezentos sian propran lernolibron, kaj la komisiono, konsistanta el José Francisco del Pozo kaj Antonio Valén, informos pri la hispanigo de la metodo *Jen nia mondo.*

Fernándo de Diego finis sian kolosan taskon: Gran diccionario Español-Esperanto, kaj transdonis ĝin al HEF-komisiono por reviziado.


La specila situacio vivita dum kelkaj monatoj en la HEF-oficejo, en 1994 tute ne permesis uzi por instruado la ejon de la asocio. Tamen, multaj kursoj okazis en diversaj punktoj de nia lando: Barcelono, Alquerias, Bilbao, Santander, Zaragoza, ktp.. Aparte interesaj estas la du-nivelaj kursoj aranĝitaj de Eŭska Esperanto-Asocio em Zarautzo

Post longa necerteco, la projekto pri Internaciaj Preuniversitataj Kursoj en Esperanto vere firmiĝis dum la lasta jaro, graŭ la senĉesaj klopodo kaj laboro de la prezidanto de HEF, Antonio Alonso Núñez. Tamen, pro manko de sufiĉa antaŭtempo por realigi tiom grandan projekton en 1995, la unua kursaro realiĝos en julio 1996a.

En la malaga kongreso, HEF lanĉis kampanjon por fari komunan mendon de la vidbenda kurso «Mazi en Gondolando». La rezulto montriĝis kiel unu el la plej pozitivaj en la tuta Esperantujo.

*Antonio Alonso Nuñez, Prezidanto*
*Marcos Cruz, sekretario*

---



# Jam aperis MAZI!

En la Universala Kongreso en Tampereo, la hispanaj mendintoj de la Mazi-kurso ricevis jam sian skatolon kun du vidbendoj, unu libro kaj kasedo. Kompreneble, ĉiu mendinto ricevos sian kurson. Ne nervoziĝu! Pensu ke, la Internacia E-Instituto devas sendi pli ol mil pakojn, kaj tio postulos iom da tempo. Atendu pacience, ĉar... per pacienco kaj fervoro sukcesas ĉiu laboro.

Depósito legal: Z-334-90. Presejo: EUROCOPIA, S.L.